

Protokolo de estrara interkonsiliĝo la 10an de marto 2016 per Skajpo.

Partoprenantoj: Anne Karin Bondhus, Ulf Lunde, Mario Machlik, Hilde Dahlberg, Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Amelie Matt.

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 11-an de februaro

Aprobata.

2. Ekonomio

Skagen Vekst 47 823 kr (Preskaŭ la samon kiel en la mezo de januaro)

Skagen høyrente: 128 165 kr

3. Jarraporto, jarkalkulo

Ni ricevis raportojn de kelkaj lokaj kluboj.

La jarraporton ni pritraktos dum la venonta interkonsiliĝo, la 14-an de aprilo.

4. Movada foiro en la UK (v. mesaĝon de Douglas 19/2)

Ni ne planas partopreni la movadan foiron en la UK 2016.

5. Elekto de komitatano A al UEA (v. mesaĝon de Douglas 16/2)

Ni reelektis Torstein Kvakland kiel komitatano A de UEA.

Jardar plenigos la enketilon kaj sendos ĝin al UEA antaŭ la limdato, la 31a de majo.

6. Kotizo - aligitaj membroj (v. mesaĝon de Douglas 16/2)

AKB kalkulos membrojn kaj pagos al UEA antaŭ la venonta interkonsiliĝo, la 14an de aprilo.

7. MVA-fritak por Norvega Esperantisto (v. mesaĝon de Judith 1/3)

La presejo NTNU Grafisk Senter (antaŭe "NTNU-Trykk"), kiu presas nian membrogazeton, postulas, ke ni prezentu al ili dokumenton kiu montras, ke ni rajtas presigi nian membrogazeton sen pagi "MVA" por tio.

Judith demandis al la presejo Indergaard & Svenil, kiuj presis N.E. ekde 2003, sed ili ne povis trovi tian dokumenton.

Verŝajne estas Fylkeskommunen en Oslo kiu povas doni al ni novan tian permeson.

Jardar trovis leteron de 2002, kie li skribis, ke li ricevis de Douglas (kiu retenis kopion en Esperantonio) la originalon de letero de Fylkesskattekontoret i Oslo, kie ili formale deklaras,

ke ni ne devas pagi MVA por N.E. kaj Esperanto-nytt. Alia konfirmo de Fylkesskattekontoret pri tio venis en marto 2003.

La tiamaj estraranoj serĉu en la arĥivoj (ĉe Jardar kaj ĉe Douglas). Intertempe ni povas demandi al Fylkesskattekontoret ĉu ili povos sendi al ni novan konfirmon.

8. Eventualaĵoj

a)

Ni ricevis de Douglas Draper la jenajn du komentojn al la oktobra protokolo:

2d) La domkomitato de Olaf Schous veg 12–18 kunvenos en Esperantonia mardon la 24/11 kaj pagos luon por tio

Tio ne estis kunveno de "komitato" (estraro?) sed eksterordinara membrokunveno (partoprenis ĉ 25, se mi ĝuste memoras) por trakti proponon pri balkonoj. Cato voĉdonis nianome. (Aliaj ne povis veni.)

4.

Ni volas fermi la kontojn de Lærerforbundet kaj Esperanto-nytt en DNB. Anne Karin petis la helpon de Douglas malplenigi la kontojn per retbanko, ĉar laŭ la banko nur Douglas disponas la kontojn tie.

Mi malplenigis la konton de E-nytt, sed mi ne disponas pri tiu de la instruista sekcio de NEL. . (Gi estas/-is sekcio, ne "forbund".) Mi povas legi la liston de la spezoj, sed ne mem uzi la konton.

Douglas

b)

AKB parolis kun Ingebjørg kaj promesis iri al la junulargastejo en Sandnes por foti la ĉambrojn. Ŝi sendos la fotojn al la estraro retroŝte.

Raportis Ulf Lunde.

La venonta interkonsiliĝo okazu la 14-an de aprilo.